

Nia feria migrado en Alpoj, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 622, 1975.09.10 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni invitis vin plilongigi la someran feriperiodon, ekprezentante raporton pri migrado okazinta en Alpoj. Ni forlasis nian domon la 3-an de aŭgusto, belan varman dimanĉon, kaj ni unue longe pigre ripozis en arbaro, ĉar nur la lundon matene ni devos renkontiĝi kun la marŝontoj

A.- Nia siestado daŭris ĝis la kvara horo posttagmeze. Tiam ni refaldis nian tablon, seĝojn kaj litojn kampingajn, ilin kuŝigis en la aŭtomobilan kofron, kaj ni forveturis.

Cl.- Ni tuj alvenis en Berno. Estas strange konstati, kiel interplektiĝas farmbienoj zorge kultivitaj kun domegoj, kiuj iras al la konkero de la ĉielo kaj de la kamparo. Kaj ankaŭ la ĉirkaŭaĵo de la amasloĝejoj estas prizorgita de homoj, kiuj ŝatas la florojn.

A.- Dimanĉe posttagmeze la traveturo de Berno estas tre rapida. La loĝantaro ĉu formigris, ĉu ripozas. Ni preteriras la federalan palacon, kie flirtadas la flagoj de la 25 svisaj kantonoj. Alta ponto supersaltas la riveron Aare, kies abunda akvo atestas, ke en Alpoj la glaĉeroj rapide fandiĝas sub la suno somera. Nun ni traveturas ambasadejan kvartalon. Ĝus riĉiĝintaj arabaj landoj instalas sian reprezentantaron en belegaj vilaoj de la pasinta jarcento kaj reorumigis la ĝardenkradojn.

Cl.- Sed jam ni eniras la aŭtoŝoseon. En dudeko da minutoj ĝi kondukos nin en plenan Oberlandon. La urbon Thun ni ne vidos, ĉar tunelo plurkilometra ĝin subveturas.

A.- Estas ĉiam impresige alproksimiĝi al la alpa montaro. La suproj sin viciĝas kiel gigantaj muroj, kaj oni sin demandas, kiel estas eble promeni aŭ eĉ vivi sur tiuj montoj. Sed baldaŭ, se oni bone observas, oni rimarkas iom ĉie dometojn lignajn, vojojn, kampojn kaj paŝtejojn, vastaj arbarojn, kaj tute supre la neĝo brilegas.

Cl.- Plurajn el tiuj montoj ni jam konas. Ni revidas la padojn, kiujn ni ŝvite sekvis. Ni rediras al ni iliajn nomojn : jen la piramida Niesen, jen la monto Niederhorn, du eksterordinaraj vidpunktoj al la alpgigantoj Eiger, Mönch kaj Jungfrau. Jen eble la monto Faulhorn, kie ni estos post tri tagoj.

A.- Enirante Oberlandon, oni tuj rimarkas civilizan ŝanĝon. La grandegajn kamparanajn farmdomojn anstataŭas ĉaledoj. Tiuj lignaj dometoj per siaj surskriboj rakontas pri la vivo de la konstruintoj kaj pri ties penso. Ĉiuj traboj, balkonoj kaj tegment-bordoj estas skulptitaj aŭ dekoraciitaj. Kaj kiel en la resto de la alemana parto de la kantono *Bern*, ĉie troviĝas floroj : en la ĝardenoj, sur la bordoj de al fenestroj, sur la fontanoj.

Cl.- La lago Thun respegulas la montojn. Sur ĝi rapidas ŝipoj : turismaj ŝipoj kun centoj da pasaĝeroj, velŝipoj, motorboatoj, kiuj post-tiras skianton. Dum dimanĉa posttagmezo tiu ĉi lago estas plena je vivo.

A.- Sed forlasante en *Spiez* la aŭtoŝoseon, ni tuj rimarkas, ke estas la horo de la rehejmiĝo por la bernanoj. Senfine invers-veturas al ni aŭtomobilaro. Ni havas la ŝancon iri en la alian sencon : raras tiuj, kiuj iras al *Interlaken*.

Cl.- Tiun ĉi urbeton ni traveturas sen halti. Kiel kutime en ĝi svarmas la turistoj. Kaj ni laŭiras la nordan bordon de la lago *Brien*z, kiu estas pli sovaĝa, ol tiu de *Thun*. Ni daŭre admiras la skulptitajn kaj florplenajn ĉaledojn. En *Brien*z ni ne povas ne halti.

A.- Unue ni promenas ĉe la bordo de la lago, rigardante la montojn kaj ties akvofalojn, kaj ni revenas laŭ la ĉefstrato, ekzamenante la skulptaĵojn, kiuj viciĝas en la montrofenestroj de la magazenoj. Lertaj metiistoj skulptas en la ligno ursojn, brutojn kaj homojn. Arto stereotipa, kiu ĉesis disvolviĝi fine de la pasinta jarcento, sed kiu ĉiam allogas la turistojn. Belajn kapojn de kamparanoj ni admiras. Kelkaj vendejoj ofertas novtipajn objektojn : ĉefe infanludilojn.

Cl.- Alvenas la momento pensi pri tranoktado. Ni veturas al arbara lageto najbara, kiun ni konas, kaj tiel ni trovas loketon por nia ruldomo. Dank'al fondaĵo ĝuste en tiu ĉi valetostariĝas originala muzeo. Malnovaj kamparanaj domoj detruotaj estas aĉetataj antaŭ ilia malapero, kaj ilin rekonstruas ĉi tie fakaj entreprenistoj. Kelkaj estas ege malnovaj. La laboro ne progresas tre rapide, ĉar la fondaĵo ne estas tre riĉa. Sed jam pluraj domoj retrovis novan vivon. Ili atendas la vizitontojn.

A.- Ni troviĝas en soleco, kiun reliefigas la sonoriladon de paŝtantaj brutoj. Ni pretigas la dormosakojn, kiujn ni portos tutan semajnon dum nia migrado en la montaro. La pezo de la ŝarĝo nin devigas rezigni kunpreni tro da aferoj.

Cl.- Dum kuirigas la vespermanĝo mia edzino flutadas, kaj la arbaro kaj rokoj donas amplekson al la muzikaĵo, tiel ke mi havas la impreson aŭdi ŝin orgenludi.

A.- Jen kiel finiĝis nia unua feria tago. La venontan semajnon ni ekraportos pri nia marŝado en la montaro.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !